

2013-01-01

La Internacia Ekzamena Komisiono anoncas pri:

## Ŝanĝoj en la movadaj ekzamenoj

La Internaciaj Ekzamenoj (IE) de ILEI UEA estas nuntempe en evoluo.

Ni nomu ilin MOVADAJ EKZAMENOJ DE ILEI, tiel la homoj pli bone povos percepti la diferencon inter ili kaj la KER ekzamenoj de UEA.

Kompreneble la rolo de UEA restas la sama: la Komitato de UEA elektas la Internacian Ekzamenan Komisionon (IEK) kaj voĉdonas pri novaj regularoj. Tute same faras la Komitato de ILEI.

Kompreneble la ekzamenoj estas kaj restas internaciaj, eĉ tutmondaj.

Apud lingvaj taskoj tiuj ekzamenoj enhavas demandojn pri kulturaj kaj movadaj konoj.

Novaĵoj estas la sekvaj:

- Nova nivelo pli baza naskiĝis. Ĝi nomiĝas UNUA NIVELO.
- Ekzistas la DUA NIVELO (kies nomo estis “elementa nivelo”)
- Ekzistas la TRIA NIVELO (kies nomo estis “meza nivelo”)

La postuloj por la dua kaj tria niveloj evoluos al pli detalaj demandoj en la kampo de nia kulturo kaj movado, sed ĝis tiam validas la priskribo de la GVIDILO pri Internaciaj Ekzamenoj de ILEI UEA elŝuteblaj sur jena paĝo: <http://ilei.info/agado/ekzamenoj.php>.

Demandoj pri la ekzamenoj iru al la prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono:

Mirejo Grosjean, Svislando, mirejo.mireille@gmail.com